Ni haltigu la masakron kontraŭ Palestino

Komunikaĵo de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro

Israelo daŭrigas la masakron kontraŭ la loĝantaro de Gazo, jam antaŭe tro penigita de la malhomeca blokado trudita de la Kvaro (UN, Usono, Rusio kaj EU). Centoj da mortintoj kaj miloj da vunditoj en senelira kaptilo, neniun manĝaĵon, neniun kuracilon, nur israelajn bombojn kaj tankojn.

La preteksto pri la terorista minaco utilas al la okupacianta ŝtato, kiel antaŭe, kiel ĉiam, por daŭrigi la ekstermadon de la palestina popolo. Tiu ĉi estas la sola vojo, kiun konas Israelo por finigi la reziston de la palestinoj kontraŭ pli ol 60 jaroj de okupacio.

La internaciaj institucioj montras unu fojon plu siajn sentaŭgecon kaj engaĝiĝmankon rilate al tiu ĉi afero. Usono vetoas kiun ajn resolucio de UN, eĉ se ĝi nur petas la finon de la alfrontoj, kaj la registaroj de la EU nur parolas intencdeklarojn kaj faras neniun kuraĝan decidon.

Ĉe ni, la Tripartio subskribas kontraktojn pri kunlaboro kun Israelo, stimuligitaj de la *Ministrejo pri Noviĝado, Universitatoj kaj Entrepreno* kaj de la *Subprezidanteco* kaj la hispana Ŝtato profitas pere de la vendo de armiloj.

La Ĝenerala Konfederacio de la Laboro de Katalunio postulas la haltigon de la militistaj operacioj, la finon de la blokadon truditan al la loĝantaro de Gazo kaj la foriron de la israela armeo el la okupaciitaj teritorioj de Cisjordanio. Pro tio ni alvokas la aliĝintaron de la ĜKL de Katalunio partopreni la agadon de subteno kaj solidareco kun la palestina popolo. Tiucele la ĜKL de Katalunio aliĝis al la manifesto de la Palestina Komunumo ĉe Katalunio (www.palestina.cat) kaj alvokas partopreni la manifestacion en la placo de la Universitato de Barcelono la sabaton 10an de januaro je la 17a horo.

Konstanta Sekretararo de la Konfederacia Komitato.
Ĝenerala Konfederacio de la Laboro de Katalunio.

Barcelono, la 7an de januaro de la 2009a

Originalo: www.cgtcatalunya.org